TAGIĜO
MONATA INFORM-BULTENO DE
ESPERANTO-ASOCIO DE BRASĪLIA
SCS - Ed. Goiãs s/603
tel.: 225-4761
Caixa Postal 04-0406
70000 - BRASĪLIA - DF - BRAZILO
JULIO 1980

## LA TUT-AMERIKA EN SAN LUIS




350 esperantistoj el 7 landoj kunvenis de la 12a ĝis la 15a de Julio en Argentino okaze de la Unua Tut-Amerika Esperanto-Kongreso.

Dek tagojn antaŭ tiu dato, ĉiuj radiaj kaj televidaj stacioj en Argentino anoncis la manifestacion. Tiun samtempan amasan informadon decidis la Ŝtata Direkcio pri Komunikado, laŭ peto de la Loka Kongresa Komitato. La brazila delegacio estis la plej multenombra post la argentina.

Honora gasto de la urbo estis D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA.

Dum tri sinsekvaj tagoj, la esperantistoj de nia kontinento havis la eblecon debati la komunajn problemojn de nia movado kaj plani nian informan agadon antaŭvide al la Universala Kongreso en Brasília. Okaze de aparta kunveno pri la 66-a U.K. pluraj dekoj de ĉeestantoj aliĝis la kongreson kaj detale informiĝis pri nia urbo.

Je la fino de la Tut-Amerika Kongreso en San Luis, la klimato de tiu urbo, tradicie malvarma, notinde plivarmiĝis pro la sento de amikeco inter la esperantistoj!

* * * * * * * *

## STANDO EN STOKHOLMO REKLAMOS PRI BRAZILO

Ni ĵus ricevis konfirmon de la LKK de la 66-a U.K., ke dum la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo speciala stando reklamos la venontjaran kongreson en Brasília. En tiu stando deĵoros brazilaj esperantistoj por disdoni informojn kaj turisman materialon pri niaj lando kaj urbo.

Intertempe, jam ĉirkaŭ 150 brazilaj esperantistoj aliĝis la kongreson profitante la specialan tarifon, kiu validos ĝis la 9a de aŭgusto.

## AKCEPTO

La pasintan monaton LKK-prezidanto kaj vic-prezidanto estis akceptitaj de Ministro Said Farhat, kiu interalie entuziasme disponigis filmon pri Brazilo por esti prezentata en Stokholmo, okaze de la 65a U.K. La koncerna teksto en Esperanto jam estas preta kaj ni atendas ĝin ricevi ĝustatempe.

o o o o

## GARANTIA KAPITALO


Sufiĉe granda nombro da samideanoj jam resendis la formulon rilate al la Garantia Kapitalo. Al ĉiuj subskribintoj niajn plej elkorajn dankesprimojn.

Oportune, ni listigos ĉiujn nomojn.

$ $ $

## BELECO KAJ LUKSO NE KOSTAS PLI...

La Loka Kongresa Komitato por la 66a Universala Kongreso ĵus pretigis la kongresan glumarkon, kiu ne nur spegulas la elegantajn kaj graciajn arkitekturliniojn



de la brazila ĉefurbo, sed ankaŭ forte impresas pro la altkvalita kaj luksa presado.

Ĝi estas simpla, tamen rava kiel la urbo kiun ĝi simboligas.

SUBTENU la 66an U.K.-n kaj PLIBELIGU vian korespondaĵon!

Kolektantoj RAPIDU ! ! !

Minimuma mendo estas folio kun 50 pecoj, kies prezo estas Cr$ 150,00

KLARIGO: Taguatinga Esperanto Rondo - TERO - atentigas pri la eraro aperinta en la numero de majo de TAGIĜO. Tero klarigas ke ne estis fondita nova Esperanto Klubo en Taguatinga sed revivigis la kvazaŭ malaperinta TERO. La kunsidhoro okazas je la 15:00-a, ĉiusabate. La adreso de TERO estas: Centro de Ensino 6, 1º Grau, QNL 1, Lote Especial, Taguatinga - DF.

## UNUA INTERNACIA KONKURSO PRI TROBOJ

San-Paŭlo Esperanto-Asocio okazigas sian Unuan Internacian Konkurson pri Troboj (Kvarversoj). La limdato por la sendo de troboj estas la 15a de septembro 1980.

Pliajn informojn:

UNUA INTERNACIA KONKURSO PRI TROBOJ (KVARVERSOJ) - Organizita de San-Paŭlo Esperanto-Asocio.

Adreso:

AV. SÃO JOÃO, 1333 - Cj. 21
01035 - SÃO PAULO - SP
BRAZILO

## FEMINISMO

*Jam de 1979 aperas kvaronjara periodaĵo SEKSO KAJ EGALECO, kiu esprimas diversajn vidpunktojn pri la virina movado kaj la vivsituacio de virinoj tra la mondo. Leteroj de legantoj okupas pli ol kvaronon de la spaco. Kvankam la revuo ne temas ĉefe pri Esperanto, ĝi ne povus ekzisti en alia lingvo. Diference de naciligvaj feminismaj revuoj, SEKSO KAJ EGALECO peras interŝanĝojn de malsamkulturaj vidpunktoj pri virinoj. Redaktas ANNA BRENNAN, p/a NIEUWE BINNENWEG 197 B, 3021 GA ROTTERDAM, NEDERLANDO, Jarbono: 8,00 gld. aŭ 10 respondkuponoj.*